NIA VOĈO
Organo de Madrida Esperanto Liceo
Atocha 98-4°.29012 Madrid
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz Majo 1993
***********************************************************************

GRAVA GEOGRAFIA ERARO

En la inform-folio kiun dissendis kune kun "Nia voĉo" aprilo, aperis eraro en la adreso de la grupo "Paco kaj amo". Vigo estas urbo de PONTEVEDRA ne de La Coruña.

**KOTIZO DE MADRIDA ESPERANTO LICEO POR 1993**

La kotizo por tiu-ĉi jaro estas sama ol 1992. Bv. **sendi ĉekon po 2.000 ptjn**, je la nomo de ESPERANTO-LICEO DE MADRID. Antaŭdankon por via kontribuo al daŭrigado de MEL.

**UK VALENCIA.**

Aliĝoj _is la fino de februaro: 1100 el 59 landoj. 179 de Hispanio. 93 germanoj.

INFANA KONGRESETO. Okazos en Alborache (Valencio) samtempe kun UK.ĝis nun aliĝis 32 infanoj. Inter ili 4 hispanoj

ANTAŬGRESO EN BARCELONO. Jam aperis programo kaj ofero de hoteloj por tiu-Ĉi evento kiu okazos inter la 20a. kaj la 23-a de julio.

UNUIĜINTAJ NACIOJ.- La Ĝenerala Sekretario sendis salut-leteron al gekongresanoj kaj deziras sukceson al 78-a UK.

GAZETARA SERVO. Dum majo ekde Madrido, oni disdonos unuan informilon al 400 adresoj de amas-medioj. Se vi havas konatulon en hispana ĵurnalo, radio-emisoro, kpt.,bv. kontakti Liceon por faciligi dissendon de novaĵoj.

EKUMENA DISERVO. Ĉefepiskopo de Valencio akceptis ke la plej grava parto de la religia programo okazos en la katedralo.

KORUSO VERDA STELO LUDOS EN U.K. Pere de subvencio de UEA kaj de la Valencia Grupo la esperanta koruso de Madrido partoprenos en la kongreso.

HELPANTOJ BEZONATAJ. LKK ankoraŭ bezonas kelkajn helpantoj por labori en diversaj taskoj dum UK. Se vi estas preta por dediĉi kelkajn tagojn al organizado bv kontakti kun Valencia grupo aŭ LKK.

VIDEO ANONCAS UK. Laŭ traduko de Fernando Moral, "Valencia convention bureau" faris esperantan version de video pri nia kongreso. Valenciaj esperantistos pruntedonis siajn voĉojn kaj oni surbendigis en profesia stud-sonejo.

**JAM APERIS "Esperanto: fenómeno de la comunicación", la plej aktuala libro hispan-lingve pri la internacia lingvo. Prezo 1.300 ptjn (inkludas IVA-on kaj sendokoston al Hispanio). 20% rabato pro pli ol 5 ekzemplerojn. ANTAŬPAGO NECESE, pere de POŜTĜIRO, al Esperanto-Liceo de Madrid. Atocha 98-4°. 28012 Madrid. NE SENDU ĈEKON.**

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

**N I A V O Ĉ O**
**Organo de Madrida Esperanto-Liceo**
**Atocha 98-4°. 28012 Madrid**
**Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz** **Majo 1993**

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO
(Nia voĉo oferas siajn paĝojn al HEF-CO por centrigi **madridajn** esperantajn informojn kaj faciligi kontaktojn kun Esperantaj grupoj kaj madridaj esperantistoj pere de revuo pli ofta ol Boletin).
Ĉiu-lunde ni kunvenos,ekde la 18.30 horo, en la sidejo de MEL, Atocha 98
Marde/ĵaŭde, ekde la 18.00 h. ĝis la 20,30 h funkcias HEF-CO (Rodriguez S.Pedro 13- 3°-7). Aliaj tagoj uzu automatan respondilon: (91) 446 80 79
Venontaj prelegoj, lunde je la 19.00h en Atocha 98-4°:
**17-a de majo "Internaciaj vortoj ĉe cirko". José Francisco Platas**

ESPERANTAJ KURSOJ EN MADRIDO
En aprilo en HEF-CO anoncis bazan kurson (36 horoj, prezo 12.000 ptjn, 9.600 kun juna membro-karto de Madrida Autonoma Komunumo) kaj perfektigan kurson (18 horoj, 6.000 aŭ 4.800 ptjn)
Daŭrigas bazan kurson en Centro Cultural, strato Maestro Alonso 6 (Ventas).Lunde, merkrede kaj vendrede je la 11,30 horo.

Korespondaj kursoj. Andalucia Esperanto-Unuiĝo. Apdo.864. 29080 Málaga
Kultura Asocio Esperantista.Font Nova 32. 08202 Sabadell
Internacia koresponda lingvokurso por progresantoj: Hungara Esperanto-Asocio; H-1368 Budapeŝto Pf.193.

**ADRESARO DE HISPANAJ ESPERANTAJ GRUPOJ**
Kontraŭ 100 ptjn en postmarkoj vi povas ricevi de MEL ekzempleron

ESPERANTO EN LITERATURO
En la fama verko "Satanaj versoj" de Salman Rusdi aperas jena frazo en paĝo 385: "Entre todas las imagenes televisuales de las tragedias híbridas- La inutilidad de los tritones, los fracasos de la cirugia plástica, la vaciedad de buena parte del arte moderno, **tan insípido** como el **esperanto**, la loca colonización del planeta- se le ofrece este regalo. Suficiente. Apagó el televisor"

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ** (Aliĝiloj ĉe MEL)
RENKONTIĜO. Kataluna E-Junularo. 24-28-a junio. Abanilla (MURCIO)
LITERATURA FORUMO EN BARCELONO. 17-a ĝis 22-a de julio
78-a ANTAŬKONGRESO EN BARCELONO. 20-a ĝis 23-a de julio.
78-a U.K. DE ESPERANTO EN VALENCIA. 24-a ĝis la 31-a de julio.
78-a POSTKONGRESO EN MADRIDO. 1 ĝis 6-a de aŭgusto.
49-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO. Vraca (Bulgario). 7-14a aŭgusto 1993. Aliĝo pere de Kataluna Esperanto-Junularo. Apdo. 32318.08080 Barcelona.
KULTURA ESPERANTO FESTIVALO. 19-22 aŭgusto. Kopenhago (Danlando)


**VIDEOKONKURSO**
Sendu videofilmon al ANTAŬKONGRESO EN BARCELONO. Carreras Candi 34-36. E-08028 Barcelona

**HEL AL KUBANOJ POR VENI AL UK**

Ana Montesinos je la nomo de asocio de amikoj de Kubo, petas mon-helpon por vojaĝigi kubanojn al UK de Valencio (La buĝeto estas 1000 pundoj se vi volas kontribui bv. sendi ĉekon al KUUK, 82 Waterford Road, Londono, Britujo,SW6 2DR. aú si vi preferas pagi en guldenoj aŭ pundoj faru ĉe UEE konto: UEA por KUU-j"

**LA FENOMENO CHESTE**

Mi multfoje aŭdis paroli pri la rilatoj inter Esperanto kaj tiu-ĉi vilaĝo de Valencio sed ĝis nun mi ne persone vidis la "fenomenon CHESTE-n". Tio okazis dum la kongreso de Valencia Esperanto-Federacio (1-2a majo).



La programo, kvankam malgranda, estis kompleta, malteda kaj bone organizita pere de la loka grupo LUMRADIO. En la kultur-domo ni rekontiĝis kun esperantistoj kaj tie-ĉi ni povis viziti interesan libroservon (kie unuafoje oni vendis publike la libron "Esperanto: fenómeno de la comunicación" eldonita de Madrida Esperanto-Liceo). Mi aplaŭdas al Luis Hernández kiu translokigas HEF-libroservo al tiu renkontiĝo por montri novaĵojn kaj klasikajn librojn.

Ankaŭ inkludis viziton al kooperativo de vinkelo kun gustumado kaj donaco de diversaj vinoj de la regiono. Poste, en la urbodomo, la urbestro prezidis kunvenon kaj faris omaĝon al kelkaj malnovaj kaj maljunaj esperantistoj kiuj persone aŭ reprezentitaj ricevis memor-platon.

Sabate la programo finiĝis per prelego titolita "Kvin vojaĝoj tra la mondo", belege planita, ne tro longa kaj tre originala ĉar temis pri kvin manieroj de ĉirkaŭigi la teron kiu alportis progreson al la homaro: 1-a, disvastigado, ekde Afriko, de la homo mem en la prahistorio. 2-a, ĉirkaŭagi ŝipe la terglobon en la 15-a jarcento. 3-a, la vojaĝo de la ondoj kiuj elsendas sonojn, bildojn kaj parolojn tra la mondo. 4-a, satelitaj orbitoj kiuj permesas ĉirkauigi teron en spaca perspektivo, kaj la kvina vojaĝo, ankoraŭ ne finita, la paroloj kiuj povas ĉirkaŭrondi nian planedon speciale se ĉiuj parolas saman lingvon.

Sekvontan tagon, dimanĉon, ni promenis tra la urbo (S-ro urbestro inkludita) kaj dum tiu promenado mi povis konstati la "fenomenon Cheste" propaokule. Antaŭ kelkaj jaroj ekzistis generacio de chestanoj kiuj parolis Esperanton, la semo estis forĵetita (precipe de du personoj, S-roj Máñez kaj Arnau) kaj forte enteriĝis kaj kreskis. Ne gravas se multaj jam forgesis paroli Esperanton, la humanisma ideo kaj la uzado de internacia lingvo por paroli kun eksterlandanoj ankoraŭ restas en preskaŭ ĉiuj vilaĝanoj. Multaj el ili ankoraŭ rememoras kiel siaj praŭloj uzis Esperanton por interkomprenigi kun la austriaj infanoj rifuĝintaj en CHESTE dum la unua mond-milito.

Hodiaŭ la junuloj de CHESTE havas la grupon LUMRADIO por daŭrigi laboron favoran al Esperanto kaj kiel memoraĵo de siaj praŭloj du stratoj de Cheste alportas nomojn de esperantistoj, kelkaj muroj havas verdajn stelojn kaj D-ro Zamenhof havas memor-tabulon kaj strato.

S-ro Urbestro, ge-sinjoroj kaj ge-esperantistoj de Cheste, DANKON.

Lupe